

# Esperanto-Fervojisto



*U.A.I.C.F. / A.F.C.E.*

*Association Française des Cheminots pour l'Espéranto*

*J.O. Associations n° 304—du 25/12/1949*



Apr – Majo – Jun 2014

N° 675

3,50 €

P 2 - 3

Ĉefartikolo

P 4 ĝis 9

Ĝ K : protokolo

P 10 – 11

Ĝ K : restado

P 12 – 13

Liona sekcio

P 14 – 15

Eksterordinara  
vaportrajno

P 16 ĝis 19

El fervoja  
mondo

P 20 – 21

Staĝo en  
Chamonix

P 22 – 23

Ni iru en  
Rumanion !

P 24

Kiel lerni E-on ?

## ĜENERALA KUNVENO DE FFEA



Kérallic : haveno

*Fotis André Mirc*

Trimonata Franca Fervojista Bulteno

Organe d'information culturelle pour la diffusion de l'Espéranto

9 rue de Château-Landon –FR 75475 Paris Cedex 10

## CONSTAT

D'année en année notre association se vide de ses éléments actifs sans que nous puissions arrêter l'hémorragie, malgré tous les efforts que nous réalisons par la propagande et les stages d'espéranto que nous mettons sur pied. Les assemblées générales que nous organisons se liquéfient à vue d'œil alors qu'elles devraient être le moment annuel le plus fort pour nous réunir. Le constat est ainsi et nous ne pouvons plus nous masquer les yeux. Moins de quarante participants à notre assemblée générale cette année, soit deux fois moins qu'il y a cinq ans. Nous avons certes cherché les raisons plausibles de ces défections. Elles sont multiples et se fondent dans la mode d'un temps plus attaché à l'image, à la perception rapide des choses à travers la télévision, à la multitude des choix associatifs culturels ou sportifs.... Une jeunesse vit dans un tourbillon d'activités alors qu'une autre,

angoissée, trime à la recherche d'un emploi. Quant au réservoir des retraités il se fait aussi plus fragile alors qu'il y a quelques années il permettait au moins la stabilité numérique de notre association. Une autre raison étouffe aussi, d'une façon globale, la santé des autres langues, c'est cette poussée sans frein de l'anglais qui inonde tous les articles des presses régionales et nationales de ses propres mots qui ont pourtant leur équivalent en français. Les J.O qui viennent de s'achever ont été une tribune pour l'anglais alors que la charte de l'olympisme implique que la langue française ait la maîtrise des opérations. Tout cela est un constat qui nous montre combien notre lien linguistique s'émousse et s'abîme dans la mouvance mondiale. Cela conduit aussi l'espéranto dans la même mouvance. C'est effarant de voir combien la grammaire française, l'orthographe sont à ce point négli-

gées comme si une porte était définitivement ouverte à l'anglais pour que cette langue y fasse son nid dans notre culture et s'y installe. Alors, faut-il se résigner ? Non.

Bien sûr on se réjouit, à juste titre que, par le truchement d'internet, nous puissions accroître notre diffusion, augmenter le nombre de nos adhérents dans le monde. Mais faut-il s'en féliciter trop vite ? L'étude devant un clavier est aussi un isolement dangereux. A quoi servirait une connaissance si elle ne s'exprime pas à l'intérieur d'un groupe, dans la convivialité et l'amitié ? Il faut reconnaître que la voie d'internet est judicieuse, mais il ne faut surtout pas abandonner les méthodes des cours du soir, ou par correspondance, ou encore les stages qui sont des liens vivants de la communication et du vivre ensemble. Continuer, remettre sur l'ouvrage, ainsi parlait Boileau. Il avait raison. Garder l'opiniâtreté combative pour n'avoir rien à se reprocher et dispenser notre

enthousiasme pour recruter, sans jamais tronquer la vérité, mais en développant les atouts que possède l'espéranto par le lien fort qui l'unit à l'humanité et aux valeurs de l'humanisme.

Le temps est au printemps, celui qui fait renaître l'espoir, alors gageons qu'une hirondelle porteuse du renouveau arrivera à tire-d'aile nous conforter dans nos ambitions associatives futures.

*Jean Mevel / Sylviane Lafargue*



## PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE FFEA, OKAZINTA EN PLESTIN-LES-GRÈVES LA 5-AN DE APRILO 2014



*De maldekstre al dekstre :  
Jean-Paul Legeard, Sylviane Lafarge, Monique Grall kaj André Delorme  
Mankas Laurent Vignaud : li fotas*

### **1. MALFERMO DE LA ĜENERALA KUNVENO**

Sylviane Lafargue, prezidanto de Franca Fervojista Esperanto-Asocio kaj vicprezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, bonvenigas kaj salutas la ĉeestantojn.

Ŝi prezentas siajn apudsidantojn : Monique Grall (ĉeforganiz-

anto de la kongreso), Jean-Paul Legeard (kasisto de FFEA), André Delorme (komisiito pri grupoj) kaj Laurent Vignaud (sekretario).

Monique Grall salutas la ĉeestantojn per kelkaj frazoj kaj deziras al ili agrablan restadon.

### **2. SALUTVORTOJ**

La sekretario legas salut-

vortojn ricevitajn el Georges Wallerand kaj, pli poste dum la kunsido, transdonas la salutojn de Bruno Henry (nun en Ĉinio), Bernadette Deschanel (redaktoro de la FFEA-bulteno) kaj de Simone Baudelot.

Ankaŭ ĉeestantaj eksterlandanoj salutas al la kongresanoj : Rodica Todor (IFEF-prezidanto) el Rumanio, Dina Deloyer el Belgio, kaj fine Vito Tornillo, el Italio, sekretario de IFEF kaj LLK-prezidanto de la venonta IFEF-kongreso en San Benedetto (Italio).

Sylviane Lafargue deklaras la ĝeneralan kunvenon malfermita.

### **Honoro al niaj mortintoj**

En la lasta jaro feliĉe atingis nin neniuj informoj pri iu ajn forpaso.

### **3. APROBO DE LA PROTOKOLO DE LA JARKUNVENO 2013**

Ĝi aperis en la bulteno "*Esperanto-Fervojisto*" n°671 sur paĝoj 4 ĝis 7. Neniu ĉeestanto havas rimarkojn kaj la protokolo estas unuanime akceptita.

### **4. AGADRAPORTO PRI LA JARO 2013**

Ĝi aperis en la bulteno "*Esperanto-Fervojisto*" n°674 (jan-mar. 2014). Neniu rimarko estas

farita kaj la agadraporto estas unuanime akceptita.

### **5. FINANCA RAPORTO 2013**

Per flugfolio ĝi estis sendita kun la bulteno "*Esperanto-Fervojisto*" n°674. Tiun raporton kontrolis Jean Mével kaj Josette Vonay : ili konstatis nenian malordon kaj gratulas pro la bona realigita laboro. Okazas voĉdono, kiu unuanime akceptas la raporton. Sylviane Lafargue aldone dankas la kasiston Jean-Paul Legeard kaj la help-kasistinon Jocelyne Millanvoye pro ilia sindonema laboro.

### **Baloto por la kontrevizoroj 2014**

Sin prezentas por partopreni en la kontrolo de la kontoj por la jaro 2014 Jean Mével kaj Josette Vonay. Ili estas unuanime akceptitaj.

### **6. ELEKTO DE KOMITATANOJ**

Laŭ la artikolo 12-a de la statutoj, ĉiujare la duono de la estraro devas esti elektita. Ĉi-jare (re) kandidatigis Denise Happi-Fosso, Bruno Henry, Hubert Peyrouy kaj Georges Wallerand. Post kolekto de la voĉdoniloj kaj nombrado de voĉdonoj (faras Denise Happi-Fosso kaj Gérard Bosc), Sylviane anoncas, ke ĉiuj kandidatoj estas elektitaj.

## **7. ĜENERALA KUNVENO EN PARIZO 2013**

La jarkunveno okazis en Parizo la 16-an de marto 2013, kun nur 15 partoprenantoj.

### **8. KOTIZOJ**

Ĉar la subvencioj malkreskas, estas proponita kotiz-plialtigo.

Fervojista aktiva membro	16 €
Ne-fervojisto	22 €
Simpatianta fervojisto	8 €
Simpatianta ne-fervojisto	11 €
Bulteno " <i>Esperanto-Fervojisto</i> "	13 €

Vigla diskuto okazas kun interesaj ideoj, interalie pri la temo, ĉu tro alta kotizo forfuĝigos novulojn. Decido estas proponi duon-kotizon por novuloj dum la unua membreca jaro, tio estas : 8 eŭroj por fervojista nova membro, kaj 11 eŭroj por ne-fervojista nova membro. Voĉdono okazas kaj la decido pri ĉiuj tiuj novaj kotizoj estas unuanime akceptita.

Sylviane refoje instigas ĉiujn FFEA-membrojn abonigi al la internacia organo de IFEF "*Internacia Fervojisto*", kies abono kostas 14 eŭrojn.

### **9. "ESPERANTO-FERVOJ-ISTO"**

Sylviane mencias la daŭran

laboron de la teamo, kiu prizorgas la asocian revuon "*Esperanto-Fervojisto*". Ĝi regule aperas dank'al André Delorme kiu kolektas la artikolojn, Bernadette Deschanel kiu enpaĝigas, Jean-Pierre Ducloyer kiu revizias, Nathalie Bayard kiu sur-paperigas, Denise Happi-Fosso kiu dissendas. Ili estas dankindaj kaj Sylviane Lafargue petas aplaŭdojn de la ĉeestantoj. Ŝi ankaŭ esprimas sian dankemon al la artikolo-verkantoj, kiuj nutras la revuon.

### **10. GRUPOJ**

Sylviane Lafargue transdonas la parolvicon al André Delorme, kiu detale kaj lumbilde prezentas la plenumitajn agadojn kaj la nunan situacion de la grupoj en Lyon, Quimper kaj Toulouse. Temas pri kursoj, organizitaj aranĝoj, staĝoj, rilatoj kun fervojistaj UAICF-asocioj aŭ nefervojistaj asocioj, informado, varbado, ktp. Dum la lasta FFEA-komitatkunsido (la 4-an de marto en Parizo), post diskuto estis deciditaj la jenaj subvencioj : 220 € (Quimper), 200 € (Toulouse) kaj 160 € (Lyon).

André konkludas sian raporton dirante, ke nun vivas nur tri regionaj sekcioj : Lyon, Quimper kaj Toulouse. Krome, li aldiras tri rimarkojn :

1) Malkreskas varbado de fervojistaj membroj, do, por la estonta bona stato de la asocio, necesos varbegi pli da fervojistoj aŭ fervojistaj familianoj.

2) La asocio devas kuraĝigi ĉiujn membrojn al trapaso de KER-ekzameno. Tio estas grava por diskonigi Esperanton en la instrumedio.

3) FFEA devas diskonigi sian ĉefan organon "Esperanto-Fervojisto" kaj en ĝi estu pli da artikoloj rilataj al fervojo kaj ankaŭ al agado de la lokaj sekcioj.

### **11. INFORMADO, VARBADO, EKSPozICIO**

Krom kutima reklamado, ĉefe farata de la grupoj, du reklamadoj estas menciindaj.

Unue, en Artigues-près-Bordeaux maje okazis la IFEF-kongreso : pri ĝi multe informis kun kelkaj rezultoj Bernard Sarlandie, membro de la Esperanto-grupo de Bordeaux.

Due ĉe la enirejo de la entreprenaj restoracioj de Paris-Est kaj Paris-Nord, FFEA-komitatoj (en Parizo por kunsido) disdonis reklamilojn al siaj kolegoj fervojistaj. Eblas menci ankaŭ papera informado pri la FFEA-staĝoj al ĉiuj SNCF-bibliotekoj, restoracioj kaj entreprenaj komitatoj (CE), ankaŭ tio ĝis nun sen

videbla rezulto.

Sylviane Lafargue memorigas, ke ekspozicia materialo estas disponebla ĉe la sidejo.

### **12. STAĜOJ 2013**

Du staĝoj okazis en Francio.

- En Parizo : 10 partoprenintoj

- En Chamonix-Argentière : 22 partoprenintoj

Al tio aldoniĝis staĝo en Rumanio, kun partopreno de 5 Francoj, dank'al la refoja organizado de Rodica Todor.

Bedaŭrinde aliajn staĝojn oni devis nuligi pro manko de interesiĝantoj.

### **13. KURSOJ KAJ EKZAMENOJ**

4 lernantoj partoprenis perleterajn kursojn : tri en la unua grado kaj unu en la dua grado.

Ene de la grupoj okazas kursoj : en Lyon, Quimper kaj Toulouse.

La Liona grupo organizis KER-ekzamenon kun 9 kandidatoj, kadre de la internacia ekzameno-tago la 9-an de junio. Vicurbestro de Lyon ĉeestis la eventon kaj disdonis la ekzamenajn dokumentojn.

### **14. UAICF**

La rilatoj kun UAICF estas tre

bonaj. UAICF helpas al FFEA ĉiuokaze.

FFEA-delegitoj partoprenis la UAICF-jarkunvenon en St-Mandrier la 28<sup>an</sup> de septembro 2013.

## **15. IFEF**

La rilatoj kun IFEF estas tre bonaj. Sylviane Lafargue, FFEA-prezidanto, plu estas vicprezidanto de IFEF, kaj Laurent Vignaud, FFEA-sekretario, plu estas IFEF-kasisto.

En majo 2013 la IFEF-kongreson organizis FFEA en Artigues-près-Bordeaux, kun granda helpo de la lokaj Esperantistoj. La aranĝon partoprenis 250 homoj el 19 landoj. Dank'al la kongresa ĉefkasistino Jeannine Daguin, la kongreso malprofitis nur je 510 eŭroj.

## **16. ESTONTAJ ARANĜOJ 2014/2015**

### **Staĝoj 2014**

--> Parizo : la staĝo ne okazis pro ne sufiĉe da aliĝintoj

--> Chamonix-Argentière : de la 21-a ĝis la 28-a de junio

--> Rumanio : restado de la 1-a ĝis la 11-a de septembro en Braşov (jam aliĝis pli ol 25 homoj, kaj planita estas Esperanto-kurso ankaŭ por komencantoj).

## **IFEF-kongreso**

En 2014, la IFEF-kongreso okazos en San Benedetto del Tronto, Italio, de la 17<sup>a</sup> ĝis la 24<sup>a</sup> de majo. En 2015, ĝi okazos en la urbo Kunming, Ĉinio.

En la jaro 2015, la UEA-kongreso okazos en Lille. Tial, FFEA aparte strebu al informado de nord-francaj kolegoj fervojistaj.

## **17. DIVERSAĴOJ**



*Rivero San Benedetto del Tronto*

Antaŭ ol fermi la kunvenon, Sylviane Lafargue rememorigas pri la neceso, por ĉiuj, nepre reklami pri Esperanto al fervojistoj kun celo varbi novajn fervojistojn por plifortigi FFEA.

Ŝi ankaŭ memorigas pri fakdelegiteco ĉe UEA. Nome de la IFEF-ĉefkomitatano Jindřich Tomišek, ŝi instigas la fervojistojn



sin proponi por iĝi fak-delegito de UEA pri temo kunligita kun fervojo. Tiel en la UEA-jarlibro aperas la mencio "*fakdelegito pri fer-vojo*" kaj Esperantistoj scias ke, en la koncerna urbo, fervojisto pretas helpi ilin pri tiu fako.

Poste ŝi transdonas la parolon al la ĉeestantoj. El ili, Josette Ducloyer informas pri ĵus farita ekspozicio "*Esperanto kaj la unua mondmilito 14-18*",

videbla en la kongresejo.

## **18. FERMO**

Sylviane Lafargue dankas ĉiujn membrojn, kiuj aktivis por FFEA, kaj deklaras la Ĝeneralan Kunvenon fermita.

*Raportis Laurent Vignaud*



## RESTADO EN PLESTIN-LÈS-GRÈVES

La jarkunveno de la esperantistaj fervojistoj okazis de la 5-a ĝis la 8-a de aprilo en la nobeldomo Kerallic, marborde en la urbeto Plestin-les-Grèves, en la departemento Côtes d'Armor.



*Jarkunveno en nobeldomo*

Partoprenis, tute aŭ parte, ĉirkaŭ 40 personoj. Kvamkam la daŭro de la kongreso estis mallonga la organizantinoj klopodis starigi plenplenan programon, kiu enhavis plaĉajn diversaĵojn : laboran parton dum la ĝenerala kunveno, ankaŭ kun estrarkunsidoj de IFEF-fakuloj por prepari la proksiman kongreson en Italio ; distraĵojn dum la tri liberaj vesperoj, tuttagan ekskurson, parte ŝipe, parte fervoje, kun halto por tagmanĝi sur la insulo Batz. Tie ni povis marŝi du horojn, aŭ, por kelkaj, viziti la tiean ekzotan ĝardenon. Profesia gvidantino akompanis nin dum



*Stacidomo*

la tuta tago, kaj klarigis la historion de tiu legomriĉa regiono, parto de la komerca t.n. *orumita zono*. Lunde, duontagaj ekskursoj veturigis nin al vizitoj de fervojaj minikonstruaĵoj en ĝardeno kaj poste al agrikultura muzeo pri la pasinteco de la agrikulturo en la jaroj 1870 ĝis 1970. Du interesaj vizitoj kiuj plaĉis pro sia originaleco kaj pro la riĉeco de la marterialo ĉu fervoja, ĉu agrikultura.



*Kongresanoj*

Koncerne la vesperospektaklojn, la ĉeestantoj bonŝancis ĝui grandan diversecon : la unuan vesperon, tradicia bretona danco-grupo el la proksima vilaĝo Garlan entuziasmigis nin per diversaj dancoj al kiuj partoprenis ankaŭ kongresanoj sub la klaraj konsiloj de la mastro kiu regis niajn piedojn por ke ni atingu ne perfektecon, sed tamen bonan nivelon sufiĉan por ricevi kontentecon. Agrablaj momentoj por ĉiuj.



*Konatuĵoj*

La sekvantan vesperon, fakulo pri la mara fiŝkaptista profesio, kun humoro, prezentis al ni la situacion en la mondo de la fiŝkaptado en la diversaj maroj kaj oceanoj.

La lastan vesperon, tri junaj virinoj ravis nin per originala spektaklo kiu miksis la gestojn, la dancojn kaj la perfektecon de la voĉoj en diversaj amuzaj strangaj kanzonoj.



*Dum spektaklo*

netoj.

Estas ĉiam agrable renkontiĝi en esperantista etoso kaj rememori la iamajn, ne tro malproksimajn epokojn, kiam pli ol cent homoj aliĝis al niaj jarkunvenoj. Tiun-ĉi jaron malpli ol kvardek ĉeestis kaj tiu konstato devigas nin pripensi estontecon kun iom da pesimismo. Aliflanke, popola diro asertas ke en la profunda nigra nokto ekaperas pli forte la volo atingi kaj trovi la lumon de la naskiĝanta nova tago. Do ni konservu nian esperon al pli bona estonteco.

La ĝeartoprenantoj certe travivis en nia bretona regiono bonegajn momentojn en la resaniga atmosfero de la marbordo kun jodaj odoroj kiuj riĉigas la freŝan aeron. La vojo al Bretonio restos ĉiam malfermita al ĉiuj kiuj scias ŝati la belajn aspektojn de la vivo.

Koran dankon al vi, ĝeamikoj, partoprenintoj al nia FFEA jarkunveno.

## Inaŭguro de la Tramo-Trajno Nantes-Chateaubriand

**La 28-an de Februaro 2014 okazis la inaŭguro de la nova tramo-trajno inter Nantes kaj Chateaubriand .**

Tramo-Trajno Nantes-Châteaubriand estas premiero en Francio ; la fervojlinio fermita ekde 1980 estis re-malfermita per uzado de tramo-trajno .

La inaŭguro okazis en la ĉeesto de ĉefministro Jean - Marc Ayrault, Frédéric Cuvillier, ministro pri Transportoj , Jacques Auxiette, prezidanto de la regiono Pays de la Loire, Jacques Rapoport, prezidanto de RFF kaj Guillaume Pepy, prezidanto de SNCF .

Remalfermi al pasaĝeroj la linion Nantes-Chateaubriand, postulis la starigon de nova fervoja infrastrukturo. Teknikaj novaĵoj estis necesaj por la interfacoj inter la fervoja procezo kaj la trama (signalaro de urba PN kaj de PN en linio, 2 tipoj de elektraĵ kurentoj).

Multaj laboroj en projektmastrumado de RFF okazis samtempe laŭ la tuta linio : me-

tado de trakoj kaj katenarioj, aranĝo de kajoj, renovigo aŭ anstataŭigo de strukturoj, kompleta elektrizo de la linio, instalado de la signal-aro kaj de telekomunikiloj, forigo de 11 traknivelaj pasejoj, ktp.

64 km-ojn longa, la linio Nantes-Chateaubriand estas la plej longa linio iam re-malfermita per tramo-trajno en Francio. La ekfunkciigo de la tramo-trajno, kiu povas atingi rapidon je 100km/h en la fervoja regiona reto, kaj oportune okazigas ekonomian disvolviĝon en la koncernaj teritorioj.

La ligne Nantes-Châteaubriant et sa desserte ...



**ZOOM SUR LA LIGNE ET SA DESSERTE**

11 gares et stations :

• Gare de Nantes	• Erbe-Achère	• Norreux-Erbe
• Mouchales-Engrolles	• La Châtaillière-Corras	• Allennes
• Gâtine (d'Ancenis)	• La Châtaillière-Aubry	• Issé
• Bataillière (gare d'attelage)	• Sauc-sur-Erbe	• Châteaubriant

## Inauguration du Tram-Train Nantes-Châteaubriant



Le Tram-Train Nantes-Châteaubriant est une première en France : la ligne ferroviaire fermée depuis 1980 aux voyageurs a été réouverte en utilisant du matériel tram-train.

L'inauguration a eu lieu en présence notamment du premier ministre, Jean-Marc Ayrault, de Frédéric Cuvillier, ministre des Transports, Jacques Auxiette, président de la Région Pays de la Loire, de Jacques Rapoport, président de RFF et de Guillaume Pepy, président de SNCF.

La réouverture au trafic voyageur de la ligne Nantes-Châteaubriant, a imposé la mise en place de nouvelles infrastructures ferroviaires. Des innovations techniques ont été nécessaires du fait de ces interfaces entre le mode ferroviaire et le mode tramway (signalisation PN urbains et PN en ligne, 2 types de courants élec-

triques).

De nombreux travaux, sous maîtrise d'ouvrage RFF, se sont déroulés simultanément sur l'ensemble de la ligne : pose de voie et de caténaires, aménagement des quais, rénovation ou remplacement d'ouvrages d'art, électrification complète de la ligne, mise en place de la signalisation et des télécommunications, suppression de 11 passages à niveau, etc.

Avec 64 km de ligne, Nantes-Châteaubriant est la ligne la plus longue jamais réouverte avec du tram-train en France. La mise en service de ce tram-train, pouvant atteindre la vitesse de 100 km/h sur le réseau ferré régional, constitue ainsi une opportunité de développement économique pour les territoires traversés.



## ĖKSTERORDINARA VAPORTRAJNO

Kio pli bela kaj nostalgiplena ol malrapida vojaĝo en luksa vaportrajno, aŭdante la fajfadon de la lokomotivo ?

En Urugvajo, same kiel en la plimultaj sudamerikaj landoj, preskaŭ ĉiuj trajnoj malaperis antaŭ tri-dek jaroj proksimume. Tamen en 2010 unu el ili reaperis, sed ne iu ajn : temis pri antikva vaportrajno ! La lokomotivo, Beyer Peacock (Manchester) el 1910, estis alportita de la angloj, kiuj kontrolis tiuepoke la fervojojn en Urugvajo ; ĝi kapablis tiri 400 tunojn kaj atingi rapidon je 100km/h.



*La lokomotivo, Beyer Peacock*

Pro manko de bonkvalita karbo en la lando, inĝenieroj elpensis alternativon : ili imagis funkciigi la lokomotivon pere de dizelpetrolo modifante la vaporkaldronon. Tio ŝajne estis unikaĵo en la mondo ĉar tia transformado ne necesis en aliaj



*La  
altcisterno*

landoj, kie karbo abundis kaj kie oni pasis rekte de karbaj vaportrajnoj al dizelaj nevaportrajnoj. Jen interesaĵo por amantoj de malnovaj trajnoj !

Dum jaroj, tiu lokomotivo tiris pasaĝer- kaj varvagonojn inter Montevideo kaj Punta del Este, antaŭ ol funkcii en la haveno de Montevideo, kie ĝi finis sian vivon. En 1996, ĝi estis donacita de AFE (Administracio de la Ŝtataj Fervojoj) al la Asocio de trajno-amantoj, kiu decidis doni al ĝi novan vivon. Por atingi tiun celon, la aliĝantoj al la asocio dediĉis milojn da laborhoroj, 200 000 US-dolarojn, kaj retrovis relojn kaŝitajn sub la ŝosea cemento. La asocio ankaŭ ricevis donace altcisternon, helpvagonon kaj vartenejon. Krom la lokomotivo, estis renovigitaj du vagonoj nederlandaj el 1952 kapablaj akcepti po 192 pasaĝerojn.

Ledo, ligno, bronzo, ĉio kontribuas al luksosento kaj al komforto en

tiu duvagona trajno dum la 30-minuta vojaĝo kiu kondukas la nun-



*La trajno en stacidomo*

tempajn vojaĝantojn de la haveno al la stacidomo de la industria norda kvartalo Peñarol (prononcu Peñarol') kaj transigas ilin rekte en la unuajn jarojn de la 20<sup>a</sup> jarcento, mezen de la industria revolucio.

Tiu kvartalo estis konstruita de angla trajnokompanio en 1890 por instalii tien siajn laborejojn laŭ la eŭropa modelo de "urboj fabrikoj". Kun si, la angloj ankaŭ alportis la piedpilkon, kaj fundis unu el la du plej famaj teamoj de la lando, la teamon Peñarol, kies simbolaj koloroj estas la flavo kaj nigro de la fervojo. Nuntempe en tiu speciala kvartalo eblas viziti la fervojan riparejon, kiu denove funkcias de antaŭ kelkaj jaroj por renovigi malnovajn vagonarojn kaj ripari la malmultajn trajnojn kiuj funkcias plu en la lando. Samtempe kun la laborejoj (riparejo, lignaĵistejo, fandejo, ktp), ili konstruis tutan urbeton je 33 000 m<sup>2</sup> por kadroj kaj laboristoj; en la 52 loĝejoj (el kiuj 8

por kadroj) loĝis en 1910 granda parto el la pli ol 2000 laboristoj. Nuntempe eblas vidi tiujn domojn, kie daŭre loĝas fervojistoj aktivaj aŭ emeritaj. Temas do pri vivanta muzeo.

Tiu kvartalo reprezentas 10% el la historiaj konstruaĵoj de Montevideo. La urbadministracio investis tie 1,5 miliardon da US-dolaroj por renovigi la paŝponteton, la stacidomon kaj la apudan placon, por transformi la atendejon en muzeon kaj administrejojn. Estas projektite renovigi la fasadon de la loĝejoj kaj instalii « atesto-domon » por montri la vivmanieron de la tiamaj laboristoj.

Tiu trajno, unika en sudameriko, ligita al la estiĝo de la fervojo en la lando, espereble baldaŭ estos agnoskita de Unesko kiel Homara Heredaĵo.



*Karine Ducloyer*

### **Aŭstrio - Germanio: ÖBB kaj DB preparitaj por vintra ekspluatado**

Por vintra laŭplana bontenado ÖBB elspezas ĉirkaŭ 40 milionojn da eŭroj jare. En tiu ĉi agado aktivas ĉirkaŭ kvinmil dungitoj. Krom modernaj neĝplugiloj kaj neĝoĵetiloj temas ĉiam precipe pri manlaboro. En aŭstra fervojreto estas 11 mil trakforkoj kun nadlo-relhejtado. Sekurecon en regiono de Alpoj kontrolas 10 lavang-komisionoj. En Germanio estas por vintra bontenado preparitaj ĉirkaŭ 28 mil da DB-dungitoj kaj eksteraj firmaoj. Liniojn laŭbezone purigas 64 neĝoĵetiloj kaj neĝplugiloj. La trafikon plifaciligas ankaŭ nadlo-relhejtado de 48 800 trakforkoj. Parto el la trajnoj trafikas en vintra periodo sur malpli longa trajnkurso aŭ kun malpli da vagonoj.

### **Ĉeĥio : Ekskurso en universitato**

Laŭ invito de Universitato Pardubice, Trafika fakultato de Jan Perner, Katedro pri teknologio kaj



trafikregado, kaj enkadre de agadplano de ĈeFEA (Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio), la 16-an de januaro 2014 okazis faka ekskurso de grupmembroj de ĈeFEA en Trafikan salonon kaj laboratoriojn en Universitato de Jan Perner en Pardubice.

Cetere la plej interesa estis vizito en Trafika salono en la Katedro pri teknologio kaj trafikregado, kie partoprenantoj povis malkovri la priservon de diverstipaj sekurec-instalaĵoj uzataj en kondiĉoj de fervoja trafiko. Ili ankaŭ povis lerni praktike bazajn al kutimiĝojn kunligitajn kun la grava kaj respondeca laboro de la trafika funkciado-personalo, en kunligo kun sekureco kaj ekonomio de fervoja trafiko, sen riska minaco por ĝia flueco kaj sekureco en ordinara ekspluatado. Sub la faka gvidado de Inĝ. Jaroslav Matuška, universitata lektoro (kaj gvidanto de terminara grupo en ĈeFEA) oni ne nur povis persone provi la priservon de miniaturaj aranĝaĵoj, ekz. surkargadon de konteneroj sur varvagonojn, trajnformadon, entrafikigon de trajno kaj ĝian veturon sur miniatura duŝpura trakaro ktp.

En trafikaj laboratorioj, ekipitaj per aŭdovida tekniko, vizitantoj malkovris la uzadon de komputa tekniko en moderna lernprocedo



de la studentoj.

Sur foto de Ladislav Částečka grupanoj de ĈFEA kun intereso malkovras la priservon de miniaturaj aranĝaĵoj kaj trafiko en



Trafika salono.

### **Ĉinio : Okvagonaj kombinaĵoj priservos Hongkongon**

En novembro 2013 forlasis entreprenon *CSR Qingdao Sifang* la unua el naŭ veturilkombinaĵoj por grandrapido, menditaj fare de kompanio *MTR Corp*. La menditaj veturiloj estas destinitaj por trafika kunligo Hongkongo – *Ŝenzhen* – *Guangzhou*. La mendo valoras 1,74 miliardojn da hongkongaj dolaroj. La okvagonaj kombinaĵoj ofertas po 579 sidlokojn. Ili estas konstruataj por rapido ĝis 350 km/h, en tunelo sub Hongkongo ili trafikos „nur“ 200 km/h. En regulan ekspluatadon la menciataj grandrapidaj trajnoj eniros en aprilo 2014, tuta linio estos finkonstruita en la jaro 2015.

### **Francio : Registaro subtenos konstruadon de pliaj grandrapidaj linioj**

Ministro pri trafiko *Frédéric Cuvillier* anoncis planon konstrui du novajn grandrapidajn fervojliniojn en longo 410 km-a. La linioj kunligos Bordozone kun Tuluzo kaj *Dax*. Finkonstruo de linioparto al Tuluzo (*Toulouse*) estas planita por 2024, kaj antaŭkalkulo prezentas monsumon je 5,9 miliardoj da eŭroj. La veturtempo inter Parizo kaj Tuluzo reduktiĝos al 3 horoj kaj 10 minutoj, kio kompare al nuna stato faros unuhoran ŝparon. Pliaj 50 minutoj estos ŝparitaj post malfermo de la linio inter *Tours* kaj Bordozone en la jaro 2017. Laŭ ministro *Frédéric Cuvillier* grandrapida fervojreto antaŭ la jaro 2032 atingos la hispanan landlimon.

### **Francio – Hispanio : Grandrapidaj trajnoj kunligas Parizon kun Barcelono**

Ekde nova trajnhoraro 2014 komenciĝis plene funkcii grandrapida kunligo de Francio kun Hispanio. Kvin trajnparoj tage, ekspluatitaj en plenumo de hispanaj veturilkombinaĵoj serio 100, liveritaj de *Alstom* (kaj elirintaj de rapidvagonaroj *TGV*), kaj francaj *TGV Duplex* kunligas diversajn urbojn ambaŭflanke de la landlimo. Al ili apartenas du trajnparoj,

trafikantaj inter Parizo kaj Barcelono, kun planita veturtempo je 6 horoj kaj 25 minutoj. Pliaj trajnoj trafikas de Barcelono al Tuluzo kaj Liono, kaj de Madrido ĝis Marsejlo.

### **Germanio : Kompanio Škoda havas filion por ekspansii okcidenten**

- Kompanio *Škoda Transportation* fondis en germana Munkeno filian kompanion. Celo de la kompanio *Škoda* :

- *Transportation Deutschland* estas alkonduki pliajn ĉeĥajn veturilojn sur trakaron en Germanio, Aŭstrio kaj...

- Svisio. Ekde decembro 2016 trafikos sur linio Nürnbergo – Ingolstadt – Munkeno veturil-kombinaĵoj de tiu ĉi

- filia kompanio, do teamo de tiu ĉi kompanio plimultigis la teknik-istojn, por garantii la servon al tiuj veturiloj de... *DB Regio*.

**Hungario** : Lakejo en *Szolnok* ne forgesas sekurecon.

En laborejoj *MÁV-Gépezset* en hungara *Szolnok* oni enkondukis ekde 2014 ekspluatadon de nova lakejo. Fermita kajuto malebligas la emision de danĝeraj substancoj kaj gasoj en aliajn spacojn de la laborejo. En aranĝaĵo okazas tuta procedo de relajado de fervojaj veturiloj de sekigado ĝis

rulpolurado. En *Szolnok* funkcias unu el la plej grandaj riparlaborejoj en tuta Hungario. Jare tie ĉi trairas renovigon aŭ bontenadon ĉirkaŭ 150 vagonoj kaj lokomotivoj.

### **Italio : Ĉu veturvojoj taksoj vere diskriminacias?**

Juĝa tribunalo de EU decidis, ke Italio laŭleĝe ne alkonformiĝis al la eŭropa leĝaro, kiu garantias sendependecon en la ekspluatado de fervoja infrastrukturo. La kortumo emfazis, ke pri la alto de pagoj por uzo de infrastrukturo respondecas la kompanio *RFI*, kiu estas parto de la nacia grupo *FS*. La sistemo laŭdire kreas diskriminacion kaj malfaciligas eniron de novaj subjektoj en merkaton. Dependigon de *RFI* al trafikministerio en kazo de kostoj por trafika vojo la juĝo indikis kiel ĉefan kialon, pro kiu ĝi plenumis kulpigon de Eŭropa Komisiono.

### **Rumanio : Vendo de vartrafikisto ne sukcesis**

Ne plenumiĝis privatigo de rumana vartrafikisto, la ŝtata kompanio *CFR Marfa*. La informon konfirmis trafikministro *Ramona Manescu*. Oni planis vendi plimultajn akciojn al privatuloj. Konkurso estis anoncita en printempo 2013, venkis en ĝi firmao *Grupul Feroviar Roman (CFR)*. Tamen tiu ĉi, antaŭ la definitiva tempolimo (meze de oktobro 2013), ne pagis premiatan koston de

kontrakto, je 202 milionoj da eŭroj. La konkurson por vendo do oni ripetos.

### **Rusio – Ukrainio : *Talgo* reduktos vojaĝtempon al Moskvo kaj Kievo**

Fine de 2014 oni enkondukos novan kunligon de Moskvo al Kievo per novaj trajnoj kun pasiva kliniĝ-tekniko laŭ la tipo *Talgo*. Vagonaroj ofertas po 414 sidlokojn en naŭ duklasaj vagonoj, en du unuklasaj kaj en kvin litvagonoj. Al konsisto de vagonaro apartenas restoracio- kaj bufedvagonoj, kaj du priservaj generatorvagonoj. Per entrafikigo de dusistemaj lokomotivoj, kaj prizorgo de pasportaj kaj doganaj formalajoj antaŭ vojaĝo sur 870 km-ojn longa linio, reduktiĝos la vojaĝ-tempo de 9 al 7 horoj. Rusa trafikisto pripensas enkonduki *Talgo*-vagonarojn ankaŭ sur trajn-kunligo Moskvo – Berlino.

### **Slovakio : Profita propono por *ŽOS Zvolen***

Eĉ 150 novajn laborlokojn povas disponigi ukraina mendo por modernigo de malnovaj kaj eluzitaj dizelektraj lokomotivoj serio 771. Kompanio *ŽOS Zvolen* fabrikis prototipon de lokomotivo por Ukrainaj Fervojoj, kaj pliaj kvin estas fabrikataj. De la malnovaj lokomotivoj konserviĝis nur boĝioj kaj framoj. Por rekordrapida kvin-

monata fabrikado muntistoj uzis ĉirkaŭ 20 km-ojn da kabloj de svisa firmao. Se lokomotivoj sur ukrainaj fervojoj montriĝos trafikkonvenaj, sekvos fabrikado de pliaj cent lokomotivoj de tiu ĉi serio.

### **Turkio : Marmora tunelo sub Bosporo malfermita**

Okaze de la Tago de la respubliko, estis solene malfermita por trafiko Marmora tunelo inter la eŭropa kaj azia partoj en *Istanbul*. Solenan inaŭguron partoprenis turka prezidento *Abdullah Gülh*, gaste venis ankaŭ rumana ĉefministro kaj prezidento de Somalio. Komencita trafiko estas limigita por ekspluatado de metroo, kiu trairas la submaran tuneltubon en kvar minutoj. Ekde la mezo de la jaro 2015 ĉi tie komencos regule trafiki ankaŭ trajnoj tra la stacioj *Halkali* kaj *Gebza*. Laŭ vizio de la investanto la tunelo povas servi ankaŭ kiel parto de trajnkurso el Tokio ĝis Londono.

Laŭ gazetoj *Železničář* kaj *Cargovák* preparis *Jindřich Tomišek*,  
Reviziis *Heinz Hoffmann*



## *Seminario en Argentière Chamonix Mont Blanc* *Stage d'espéranto Chamonix Mont Blanc*

21-an de junio - 28-an de junio 2014

### INDIVIDUA ALIĜILO *BULLETIN D'INSCRIPTION*

Organizanto sekcio Liono <i>Organisateur</i> Section Lyon	<b>A F C E - Association Française des Cheminots pour l'Espéranto</b> <b>FFEA - Franca Fervoĵista Esperanto-Asocio</b> 9 rue du Château-Landon - 75475 PARIS Cedex 10 France Tél: +33 4 78 38 28 85 -Tel: +33 6 81 64 89 60 Courriel : Retadreso : <a href="mailto:uaicl.afcesperanto@orange.fr">uaicl.afcesperanto@orange.fr</a> Courriel : Retadreso : <a href="mailto:pascale.voldoire@lvman.net">pascale.voldoire@lvman.net</a>
--	---

\*  Viro -*homme*  Virino -*femme*  FFEA / AFCE membro -*membre*

Cotisations / Kotizoj	Cheminot / fervoĵistoj	non-cheminot / ne fervoĵistoj
séminaire / seminario	<b>95 €</b>	<b>105 €</b>
AFCE / FFEA : (pour les non-membres / por ne-membroj)	<b>28 €</b>	<b>33 €</b>

**Familia kaj Persona nomoj :** *Nom et Prénom :*

**Kompleta adreso :** *Adresse complète:*

**Ret-adreso -Courriel:**

**Poŝtelefono - Mobile :**

Mi deziras loĝi kune kun (*Je désire loger avec*) : -

- Mi alvenos aŭte                      trajne                      je la                      horo  
 J'arriverai en voiture                      en train                      à                      heures.

Niveau / Nivelo - Débutant / Komencantoj	Niveau / Nivelo - Perfectionnement / Progresantoj	Niveau / Nivelo - Groupe de conversation / Konversacia grupo
Evidantino : S-ino <b>Mari Lou Cochard</b>	Evidantino : S-ino <b>Josée Lafosse</b>	Evidantino : S-ino <b>Rodika Todor</b>
<i>Elektu per kruĉmarko</i>	<i>Elektu per kruĉmarko</i>	<i>Elektu per kruĉmarko</i>

**Pago resumo / Résumé pour le paiement**

<b>Gastoprez* 21/06/2014 ĝis 28/06/2014</b> (7 noktoj) por unu persono, 2-lita ĉambro aŭ 4 lita ĉambro <i>Hébergement* du 21/06/2014 au 28/06/2014</i> (7 nuits) pour une nuit par personne, chambre à 2 ou 4 lits	<b>440 €</b>	
<b>Krompago por individua dorm-ĉambro (7 noktoj)</b> <i>Supplément pour chambre individuelle (7 nuits)</i>	<b>45 €</b>	
<b>Kotizo por seminario / Cotisation au séminaire</b>	<b>95 €</b>	
	<b>105 €</b>	
<b>Kotizo AFCE / Cotisation AFCE</b>	<b>28€</b>	
	<b>33€</b>	
<b>Tuta sumo / Total final</b>		

\*la gastoprez entenas tranoktadon, matenmanĝon kaj 2manĝojn **inkluditajn telferojn por la semajno**

\*L'hébergement comprend la nuit, le petit-déjeuner et 2 repas, inclus le Multi-Pass 6 jours Vallée de Chamonix donnant accès à l'ensemble des remontées mécaniques.

<b>Pago-eblecoj</b>	<b>Possibilités de paiement</b>
Ĉekon je la nomo de <b>A F C E</b> Sendu aliĝilon kaj ĉekon al :	Chèque au nom de <b>A F C E</b> Adressez le bulletin d'inscription et le chèque à :
<b>UAICL Lyon - Sinjorino Pascale VOLDOIRE 4, Allée du Coteau 69530 - BRIGNAIS - France</b>	
<b>IBAN - FR81 2004 1000 0107 4026 0L02 054 - BIC - PSSTFRPPPAR - Banque Postale Paris</b>	
La eksterlandanoj pagas la restadan koston kun indikoj <b>I B A N</b> ĉisupre.	<i>Les étrangers paient le séjour suivant les indications <b>I B A N</b> ci-dessus</i>
Ebleco fari 2 ĉekojn : la unua kun la aliĝilo kaj la alia la 15an de majo 2014. <i>Possibilité de payer en 2 fois : un chèque à l'inscription et le deuxième le 15 mai 2014</i>	

☐ Mi konscias, ke mi devas havi propran asekurecon pri sano kaj akcidento

☐ *J'ai conscience que je dois avoir une assurance couvrant santé et accident.*

<b>Loko-Lieu</b>	<b>Dato-Date</b>	<b>Subskribo-signature</b>

**Atentu ! DATLIMO por aliĝi : la 15an de majo 2014 Post tiu dato, krompago de 20€ por unu persono.**

**Attention !** *Date-limite d'inscription : le 15 mai 2014, après cette date, le prix sera majoré de 20 € par personne.*

**Adreso de la restadejo - Adresse de la résidence :**


**Résidence-Vacances de l'Association Touristiques des Cheminots 132 chemin du Grand-Moeu-Argentière 74400 Chamonix Mont Blanc -France Tel : +33 4 50 54 01 65**

**Per trajno :** alveno al stacidomo St Gervais le Fayet kaj poste trajno ĝis Argentière (je 200 metroj for de la restadejo)

*En train : arrivée à la gare de St Gervais le Fayet, puis train jusqu'à Argentière (à 200 mètres de la Résidence)*

## RUMANIO / DANUBDELTO

**Granda bonŝanco !  
Post la alpa staĝo, eblas al vi partopreni al tiu,  
kiu okazos en Rumanio.**





La delto troviĝas, kie la rivero Danubo fluas en la Nigran maron.

Ĝi konsistas el proksimume dekkvin brakoj.

Ĝi kuŝas en Rumanio ( $\frac{3}{4}$ ) kaj en Ukrainio ( $\frac{1}{4}$ )

En la rumania parto, estas natura regiono, protektita kaj registrita kiel monda heradaĵo.





*ibisoj*



*pelikanoj*

La Danuba delto gastigas pli ol 1 200 speciojn de plantoj, 300 speciojn de birdoj kaj 45 speciojn de riverakvaj fiŝoj en siaj multnombraj lagoj kaj marĉoj.



*Pelikanoj*

*kaj*

*Kormoranoj*

**J'ai rendez-vous avec vous !!!**

**Mi rendez-vous kun vi kaj regionaj agadoj kaj... la gastemeco... Ĉi sube vi povas trovi kontakteblojn de respondejoj de via FFEA-sekcio.**

**J'ai rendez-vous avec les activités régionales et la convivialité... Vous pouvez trouver ci-dessous les coordonnées des responsables de votre section AFCE.**

Urbo aŭ Regiono	Prezidanto aŭ Delegito	Telefono	Retadreso
Caen	A.Dubois	02 31 82 31 45	<a href="mailto:andre.dubois@fnac.net">andre.dubois@fnac.net</a>
Lyon	A.Delorme	04 26 65 07 28	<a href="mailto:delormea48@gmail.com">delormea48@gmail.com</a>
Paris - IDF	D.Happi Fosso	06 83 14 30 23	<a href="mailto:denise.happi.fosso@gmail.com">denise.happi.fosso@gmail.com</a>
Quimper	P. Le Vern	02 98 56 21 94	<a href="mailto:plevern@wanadoo.fr">plevern@wanadoo.fr</a>
Toulouse	A.Mirc	05 62 89 92 96	<a href="mailto:andmir@wanadoo.fr">andmir@wanadoo.fr</a>

**Merci d'envoyer vos articles à André Delorme (Lyon)**  
**Articles de 200 à 250 mots accompagnés de 2 ou 3 photos.**

## Kiel lerni esperanton ?

Perkorespondaj kursoj  
dum la tuta jaro, je via ritmo

Staĝo en Francio  
L'ARGENTIERE apud Chamonix  
de la 21a ĝis la 28a de junio 2014

Staĝo en eksterlando  
RUMANIO ĉe la danubdelto  
dato difinota

Pour tous renseignements, s'adresser à : Christian Dardenne - 9 rue de château-Landon  
FR 75475 Paris Cedex 10 / Retadreso : [stage.esperanto-afce@laposte.net](mailto:stage.esperanto-afce@laposte.net)

## Comment apprendre l'espéranto ?

Par correspondance  
toute l'année à votre rythme

Stage en France  
L'ARGENTIERE près de Chamonix  
du 21 au 28 juin 2014

Stage à l'étranger  
ROUMANIE près du delta du Danube  
date à déterminer

Retrouvez-nous sur le web :

<http://ifef.free.fr/afce>    aŭ    <http://ifef.free.fr/ffea>

Abonnement annuel :	13 € / Banque Postale. : A.F.C.E. 7 402 60 L Paris
Directrice de Publication :	Sylviane Lafargue : 9 rue de Château Landon - FR 75475 Paris (10)
Rédactrice :	Bernadette Deschanel : 64 chemin du grand Montagné 30400 Villeneuve-lès-Avignon retadreso : b.deschanel.30@gmail.com
Correcteur :	J. P. Ducloyer : jeanpierre-ducloyer@club-internet.fr
Imprimerie :	U.A.I.C.F. 9 rue de Château Landon—PARIS 10° C.P.P.A.P. 0311687773